

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =
frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.

Pago por anoncoj:

15 ore = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige. (Svedujo.)*

II:a jaro.

Marto 1897.

N:o 3 (15).

Jozef Wasniewski.



Kiel tondro min frapis la neatendita sciigo pri la subita morto de Wasniewski. Antaŭ 10 tagoj li estis ankoraŭ plena de vivo, plena de esperoj, kaj la 13-an de februaro li adresis al mi sian lastan leteron; ĝis la lasta tago de sia laborplena vivo li ne ĉesis zorgi pri Esperanto kaj mortis kiel militisto sur sia posteno, kun bataliloj en la mano, vokante al la batalo. En sia lasta letero li sciigis, ke la referatoj en la kongreso de ĵurnalistoj en Stockholm povas



esti farataj nur en lingvoj franca kaj germana, petis sciigi pri tio ĉi en la "Lingvo Internacia", petis movigi la demandon pri la prezento de nia lingvo antaŭ tiu ĉi kongreso, promesis sian detalan projekton de tiu ĉi entrepreno, promesis baldaŭ alsendi la tradukon de la plej nova novelo de Sienkiewicz por la "Biblioteko", sciigis ke la komenco de tiu ĉi traduko jam estas preta, sed... la kruela morto en unu momento interrompis lian laboron, liajn intencojn, liajn zorgojn!

Se iu meritas la nomon de vera esperantisto, tio ĉi estas Wasniewski:

li neniam perdis esperon, li neniam ĉesis batali por la venko de nia lingvo. En la tempo plej malfacila, en la malfeliĉa jaro 1895, liaj leteroj spiris per espero kaj kuraĝo kaj enspiris esperon kaj kuraĝon al aliaj. Alte kaj firme li tenus ĝin ĝis nun, se la sorto ne volus alie. Li estis nia apostolo en Polujo kaj lia morto faras veran malhelpon al la sukcesoj de Esperanto en tiu ĉi lando. Ĵurnalisto laŭ la profesio, li neniam forlasis la okazon paroli pri nia lingvo kaj prezenti ĝin en la lumo plej favora. Pri tio ĉi bone scias niaj amikoj, kiuj korespondas kaj legas la gazeton. Ni ĉiuj perdas en tiu nobla homo amikon kaj varman kunideanon.

Wasniewski neniam, ŝajne, ĝuis bonan sanon. Li malsanis en la jaro pasinta kaj ankoraŭ la 7-an de februaro de tiu ĉi jaro li skribis: "Mi jam sendus al Vi la komencon de l' novelo de Sienkiewiĉ, kiun mi tradukas laŭ la mezuro de ĝia elirado en peterburga gazeto "Kraj", sed ree la malsano tute subite kuŝigis min en la lito por unu plena semajno. Terura reŭmatismo de manoj kaj brusto turmentas min ankoraŭ multe, kaj ĝi estas des pli malplezura, ke ne sole malfaciligas al mi la skribadon, sed premas la koron, kiu ĉiam estas malsana per nevralgio. — Danke al diversaj kuraciloj la doloro iom pasis, tial mi ree daŭrigos traduki..." Tia li estis ĉiam — dum la lastaj jaroj almenaŭ — li doloris kaj laboris, kaj mi posedas leterojn, kiujn li skribis al mi per mano tremanta, kuŝante en la lito.

Kiam mi skribas tiujn ĉi liniojn, mi havas ankoraŭ neniam detalajn sciigojn pri la lastaj horoj de nia amiko. Mi ne dubas tamen, ke la varsoviaj esperantistoj konatigos nin kun la privata vivo de nia pola apostolo kaj kun liaj lastaj tagoj. Lia nomo estas enskribita per literoj nemalaperigeblaj en la historio de nia juna lingvo, kaj lia lasta deziro prese esprimita — la prezento de Esperanto antaŭ la kongreso en Stockholm — estas lia testamento esperantista kaj *devas* esti plenumita de la amikoj, kiuj lin sciis kaj amis.

Wasniewski ne estis maljunulo. La morto lin prenis en la aĝo de l' matura prudenteco, kiam la fortoj de l' saĝo floras kaj promesas bonajn fruktojn. Li multe ankoraŭ farus por Esperanto, se la sorto lasus lin vivi.

Ripozu en paco, kara amiko neforgesebla. Vi meritis la pacon kaj ripozon!

V. Gernet.

* * *

De la estimata aŭtoro de nia lingvo, d-ro *L. Zamenhof*, ni ricevis la sekvantajn liniojn pri Wasniewski:

Ĵus mi ricevis la malĝojan sciigon, ke vespere la 19-an de Februaro post 10-hora malfacila suferado mortis en Varsovio (de malsano de koro) unu el la plej fidelaj amikoj de nia afero, la pola ĵurnalisto kaj poeto Jozef Wasniewski. Niaj amikoj konas bone tiun ĉi nomon el la diversaj artikoloj, kiujn la mortinto skribis antaŭe en la "Esperantisto" kaj poste en la "Lingvo Internacia". S-ro W. estis la ĉefa kaj plej laborema reprezentanto de nia afero en Varsovio kaj entute en Polujo. Li tradukis en lingvon polan la propagandan broŝureton kaj penadis ĉiam vastigadi ĝin kiel eble plej multe; li tradukis en lingvon polan ankaŭ la lernolibron N:o 77, sed tiu ĉi traduko, pro manko de mono, bedaŭrinde ĝis nun ne povis esti eldonita. En la "Esperantisto" li kondukadis siatempe la rubrikon "El la mondo". Sed lia ĉefa merito por nia afero konsistis en tio, ke li la unua komencis la tre gravajn

vojaĝojn inter-esperantis'tajn, kiuj poste trovis imitantojn kaj brilante montris al la mondo la grandan taŭgecon de nia lingvo por buŝaj komunikigoj inter personoj de malsamaj landoj kaj nacioj. Tri fojojn li vizitis Svedujon, kie li uzadis la lingvon Esperanto, kaj en la lasta tempo li vizitis Danujon, kiel ni vidas el lia letero en la Januara numero de nia gazeto. En somero de 1896 li akceptis en Varsovio la esperantistojn svedajn kaj servis al ili en tiu ĉi urbo kun la plej sincera amikeco. Li uzadis ĉian okazon, kiun li nur povis, por paroligadi pri nia afero la polajn gazetojn.

Saluton al Via tombo, nia kara, tro frue mortinta amiko!

L. Zamenhof.

* * *

Ni ricevis el Varsovio de unu amiko al nia mortinta Jozef Wasniewski la sekvantan leteron, kies enhavo, kvankam koncernas la saman temon kiel la artikoloj de V. Gernet kaj L. Zamenhof, devas esti por niaj legantoj treege leginda. Estas la dolora sopiro de profunda amikeco, disŝirita per la morto:

La ⁷/₁₉ febr. en 10:a horo vespere post mallonga sed malfacila sufero mortis pro anevrismo la pola esperantisto, poeto *Jozef Wasniewski*. — La lingvo Esperanto perdis kun li unu el siaj plej veraj amikoj, kaj la homaro — unu el siaj plej bonaj membroj... Ĉar malofte oni povas renkonti tian bonan homon, kia estis la mortinto. Vera idealisto, tamen kaŝita sub severa kovrilo de pesimismo, kun animo neordinare delikata kaj sentema, li varme amis ĉion malfeliĉan, malgrandan, malriĉan, kaj multe suferis vidante malbonaĵojn, kiujn li ne povis helpi. Ne estis ies fremda malĝojo kaj sufero, kiuj ne trovis revokon en lia bona, honesta koro. Ĉiam li estis preta per tuta ebleco konsoli kaj helpi ĉiujn malfeliĉulojn kaj prematojn... Kaj ĉiuj amis lin — publiko por lia talento, liaj amikoj por lia bonega karaktero kaj altaj, noblaj animaj ecoj... Kaj jen, tian malordinaran homon malbela, terura morto kaptis per siaj malvarmaj brakoj, kaj disŝiris la fadenon de lia ankoraŭ juna 38-jara vivo kaj la disfloriĝon de lia talento!

Dormu trankvile, kara amiko! Via malfeliĉa multesuferinta koro ripozos en malvarma tero kaj via pura animo ne timos Dian juĝon...


A. Proŝoroviĉ-Koĉmarenko.

Varsovio ⁹/₂₁ 1897.

* * *

Ĝus kiam la numero estas preta por presado alvenas al ni el Polujo *kvar* nekrologoj pri Wasniewski. Ni bedaŭras, ke manko de loko nin malhelpas uzi ilin en tiu ĉi numero kaj promesas, ke ni en sekvanta n-ro donos al niaj legantoj almenaŭ unu el ili — tiun, kiu estis presita en la estimata pola gazeto *Przeгляд Tygodniowy* kune kun la portreto de W. Ĉiuj la nekrologoj estas treege simpatiaj kaj spiras la plej varman amon al nia mortinta amiko. Ankaŭ en svedaj gazetoj oni legis simpatiajn notizojn pri li — li estis tre konata en Svedujo kaj posedis multajn svedajn amikojn.

La red.



Novajoj.

Oferado kaj propagando.

— S-ro *N. Sutkovo* aliĝis al la propono de s-ro *Avilov* kaj decidis oferi 1^o/₀ el siaj enspezoj. Li transsendis al s-ro *Gernet* 0,50 r. — S-ro *Gernet* oferis 18,00 r. kiel 1^o/₀ el siaj enspezoj por la jaro 1896.

— *Nova klubo*. Oni al ni skribas ke en Louhans, malgranda franca urbo, malkovriĝis antaŭ kelka tempo klubeto esperantista, dank' al la agado de sinjoroj *Gabriel Chavet* kaj *Charles Dannenmüller*. Tiu klubeto intencas lernigi la lingvon internacian al la novaj esperantistoj de la urbeto kaj disvastigadi nian aferon. La unua kunsido efektiviĝis je la 7:a de Februaro. Sinjoro *Gabriel Chavet*, prezidanto, paroladis antaŭ la societanoj pri la ĉiaĥoma utileco de lingvo internacia kaj aparte de la lingvo Esperanto.

— Oni sciigas nin, ke la societo "Espero", en Peterburg aranĝas grandan publikan paroladon pri nia lingvo. La detalojn ni komunikos ĝustatempe.

— La klubo esperantista en Uppsala presigis propagandan folion pri Esperanto en kompara teksto sveda kaj esperanta. La folio, kiu sendube bone efikas por nia lingvo, estas ricevebla de l' kasisto de la klubo. Kosto kr. 6,00 por 1000 kaj 0,75 por 100 ekz.

* * *

Biblioteko.

— Eldonantoj de la Biblioteko fariĝis ankoraŭ sekvantaj personoj:

V. F. Ŝmurlo (100 rubloj unutempe), *F. D. Avilov* (10 rubloj ĉiujare), *I. D. Ostrovski* (10 rubloj ĉiujare), *Esperantista Klubo en Uppsala* (25 fr. ĉiujare).

* * *


Nova literaturo.

— Oni sciigas nin, ke jam eliris la verketo de s-ro *A. Zakrjĵevski*: Regularo por komencantaj fotografistoj. Kosto 15 centimoj. Estas ricevebla de d-ro *L. Zamenhof*, *Grodno*.

— Estas donita en presejon la nova vortaro esperanta-sveda, kiun ellaboras s-ro *P. Nylén*. La unua folio estas jam presita. La verko kostos kr. 0,60 kaj enhavos ĉirkaŭ 60 paĝojn. Estas tralegata de d-ro *Zamenhof*.

— La klubo Esperantista en Uppsala ankaŭ komencis preparadon de nova vortaro sveda-esperanta, ĉar de la ĝisnuna restas nur malgranda nombro. Sed ĉar la pretigado de la verko estas malfacila kaj malrapida, petas la klubo, ke ĉiu, kiu posedas pli grandan nombron ol li mem bezonas de n:o 68, volu vendi al la klubo tiujn ekzemplerojn. — Samtempe la klubo petas ĉiun, kiu volas fari rimarkon aŭ ŝanĝon aŭ esprimi ian deziron pri la nova vortaro sveda-esperanta, ke li volu letere komunikiĝi kun s-ro *P. Nylén*, Uppsala.

— Estas eldonata (de la Klubo Esperantista en Uppsala) folieto *Nova literaturo de la lingvo internacia Esperanto en la jaro 1896*. La folieto enhavas nomaron de la n:oj 85—103 de nia literaturo kaj sciigon pri la baldaŭ eldonotaj libroj esperantaj. Kosto kr. 0,05.



Ion aŭ nenion? ¹⁾

En la jaro 1895 la aŭtoro de la lingvo Esperanto skribis: "Kvankam ni mem ordinare uzas ankoraŭ en la plej granda parto da nomoj ortografion originalan, ni tamen ne dubas, ke iom post iom en nia lingvo por ĉiuj nomoj enradikiĝos ortografio fonetika" ²⁾. Tiu-ĉi espéro estas tute natura por aŭtoro de lingvo, havanta en la nombro de siaj reguloj la tezon: "Ĉiu vorto estas legata tiel, kiel ĝi estas skribita" ³⁾. La kaŭzoj de tiu-ĉi regulo estas saĝegaj kaj por ĉiu videblaj. Povas esti, ke la uzado de ĝi iafaje havas ian neoportunecon, sed estas ankaŭ tre natura, ke oni volonte toleras negrandan maloportunecon por konservi ian tre gravan indon. "Elĵeti infanon, elverŝante akvon el kuvo" ĉiam estas afero tute nedezirinda.

Ortografio de l' nomoj propraj en la lingvo internacia estas atentinda demando. Oni devas konfesi, ke la logika konkludo el la supremontrita regulo — fonetika ortografio — havas siajn malfortajn flankojn kaj, s-ro René Lemaire bone montris ilin (L. I. 10—11). Sed montri malfacilaĵojn de temo kaj solvi ĝin ne estas la sama. S-ro Lemaire en tiu-ĉi okazo pensas, videble, alie: li deziras nome tielmaniere solvi la temon kaj li solvas ĝin tre originale. Li anstataŭigas *x* de temo per *y* — kaj la solvo estas trovita. Tio-ĉi estas ne malpli simpla, ol klasika solvo de Aleksandro Macedona, sed senfine malpli fruktoportanta. Ĉar s-ro Lemaire nomis min kiel unu el fonetikanoj, do mi vole-nevole devas paroli en nomo de ili.

Mi ripetas: malfacilaĵoj de l' demando estas bone montritaj de s-ro Lemaire. Malfacilaĵoj ekzistas, tio-ĉi estas vero; sed tute ne estas vero, ke ili estas la kaŭzo uzi nacian ortografion. S-ro Lemaire faras la sekvantajn konkludojn:

1) "La ortografio fonetika estas neuzebla, ĉar ekzistas nenia regula rimedo por koni ĝin."

2) "La ortografio fonetika estas neuzebla, ĉar la nesufiĉo de la alfabeto malpermesas ĝin absolute."

3) "La nesciado de la elparolo estus fonto de barbarismoj almenaŭ tiel produktemaj kiel la nesufiĉo de alfabeto" ⁴⁾.

4) Kaj danke al ĉio dirita venas la fina konkludo: oni devas skribi nomojn en Esperanto tiel, ke la alilandaj esperantistoj ne povu tralegi ilin.

La lasta tezo ne estas mia ŝerco: ĝi estas tre serioza diro de s-ro Lemaire. Ekzistas multe da nomoj, por kiuj en Esperanto mankas sonoj; oni ne povas skribi ilin en E. precize; tiu-ĉi neprecizeco estas unue neeleganta, due ĝi promesas amason da barbarismoj; sekve ni esprimu ilin per sonoj, neekzistantaj por E. ⁵⁾ t. e. — mi kondukas konkludon ĝis ĝia fino — ni skribu ilin tiel, ke alilanda esperantisto, kiu devas scii nur sonojn de E., anstataŭ ia, kvankam nepreciza nomo — havu tute mortan por li nomon. Mi tre deziras scii: kiu gajnus, kaj kion, per tia ekstreme stranga rimedo?

Tiu-ĉi neatendita konkludo venis pro tio, ke s-ro Lemaire legis ne tute atente la demandon n:o 1 en n:o 8 de "L. I." Pli atenta legado montrus

¹⁾ Ankaŭ unu respondo al la dem. 1, en nia n:o 8, 1896. Ni memorigas ke kvankam ni presas tiun-ĉi artikolon — kiel ĉiujn al ni alvenantajn respondojn — ni mem ne havas la konvinkon por kiu batalas s-ro Borovko. *La Red.*

²⁾ "Esperantisto" 1895. N:o 2, p. 25, rim.

³⁾ Gramatiko. C, § I.

⁴⁾ "L. I.", 10—11, p. 204—205.

⁵⁾ l. c.

al li, ke demando estas redaktita ne tute vere, ĉar ĝi faras nenian diferencon inter diversaj ordoj de propraj nomoj kaj supozas, ke la reguloj de ortografio de historiaj nomoj, ekzemple, kaj de nomoj de ordinaraj homoj devas esti la samaj. Almenaŭ la formo de la demando donas rajton pensi tiel — kaj s-ro Lemaire ĝuste tiel komprenis ĝin¹⁾. Sed tio ĉi povas esti eraro.

En la nomo "Byron" litero *y* esprimas la sonon mezan inter *aj* kaj *oj*. Por persono, nescianta anglan lingvon aŭ tiun-ĉi fakton ĝi tute ne estas videbla, kaj li povas legi: Biron, — kio antaŭ nelonge okazis kun unu mia gasto. Li rimarkis en mia kabineto grandan portreton de l' poeto, vizaĝon de kiu li neniam vidis, kaj li tralegis laŭte la anglan subskribon: "Biron". Por persono kiu konas rusan historion, estas videbla la tuta komismo de tiu-ĉi malgranda fakto; granda poeto kaj granda filo de Spirito danke al unu litero aliformiĝis en grandan prozanon kaj grandegan friponon. La tradukinto de "Kain" estis singardema kaj krom la ortografia nomo de l' poeto metis en krampoj la fonetikan ortografion de lia nomo. Sed se nomo postulas krampojn, ĝia signifo antaŭ ili estas senutila: kian utilon havas vorto, se ĝi estas nelegebla per si mem? Sen krampoj ĝi estas morta vorto; *vorto* do efektiva ĉiam devas esti viva.

S-ro Lemaire ne povas trankviliĝi pro la penso, ke lia nomo aŭ, ekzemple, la nomo de s-ro de Beaufront povas esti skribita fonetike. Unue: tio-ĉi ne estas bezona; due — kial tio-ĉi estas neebla? Pro manko en Esperanto de nazaj sonoj kaj pro speciala eco de franca *e* neakcentita, tio kaj alia tuj donas "barbarismojn". Sed kiu diris al s-ro Lemaire, ke la nacia ortografio malpermesas "barbarigi" nomojn? Kiam mi kaj miaj odesaj amikoj ne estis konataj persone kun s-ro V. Langlet, ni ne sciante pri franca deveno de lia nomo elparoladis ĉiujn literojn de ĝi: Langlet. Kaj nia sveda amiko, kaj aliaj uppsalaj esperantistoj, ne sciante devenon de la nomo de unu el ni, nome de s-ro V. Gernet, elparoladis ĝin france: Gerne, kvankam tiu-ĉi nomo de niaj amiko ĉiam havis ĉiujn sonojn. Por s-ro Lemaire tio-ĉi estas "barbarismoj"; kio do aperigis ilin? Lia rimedo kontraŭ barbarismoj estas tiel efektiva en tiu-ĉi rilato, ke mi tuj igos s-ron Lemaire mem fari ilin; mi petas lin elparoli polajn nomojn *Przestrzelski* kaj *Brzozowski*. Mi vetas kapon, ke li barbarigos ilin, ĉar eĉ la rusoj, nacio parenca al la pola, ofte aliigas ilin. Unua nomo estas *Pšestšelski* kaj la dua — *Bjōzovski*, kaj tiuj samaj literoj *rz* signifas en la unua sonon *ŝ* kaj en la dua sonon *ĵ*. Kaj se vi rifuzas elparoli ilin, tiuj-ĉi nomoj estos por vi neekzistantaj; oni povas skribi ilin per ĥinaj literoj aŭ simple per punktoj: en ĉiuj tri okazoj la rezultato estos la sama.

Ni vidas eĉ en tia malprofunda prospekto, ke la demando postulas pli atentan rilaton. S-ro Lemaire bone kritikis fonetikan ortografion, sed lia rimedo detruas lian kritikon, ĉar kun ĝi li donas al la fonetikanoj batalilon, forĝitan de lia propra mano. Fonetikanoj donas tamen ion; s-ro Lemaire donas nenion. Li sekve tute ne solvis la temon.

Mi estas tre malproksima de filologio kaj mi ne pretendas montri "filologian" eliron el tiu-ĉi alternativo. Sed dume neniu donis ĝin oni devas elekti eliron malpli malprofitan. Tielan solvon de temo, ŝajnas al mi, oni povas trovi, se oni ĉiam memoras, ke lingvo internacia ne estas filologia ludilo,

¹⁾ Ni absolute ne komprenas, kiaj vortoj de nia demando igis s-ron Borovko pensi, ke "la redakcio faras nenian diferencon inter diversaj ordoj de propraj nomoj". Ni nur notis la demandon kaj petis *detalajn* respondojn kaj opiniojn, nenion antaŭdifinante.

sed praktika ilo. Ni faru nun kondiĉon, ke la simpleco kaj la facileco de l' lingvo internacia estas plej gravaj punktoj, kaj ke kompare kun ili la preciza esprimado de ia nomo estas afero tute negrava. Ni pensas, ke tiu-ĉi kondiĉo renkontos nenian rediron. Rusa dua ĉefurbo *Moskvá* estas en tiu sama tempo *Moscou* (fr.), *Moskau* (germ.), *Moscow* (angl.), *Móskva* (p.) — kaj t. p. Kio fariĝis danke al la tio al rusa Moskva? Absolute nenio. Kio fariĝis al ĝi se ni farus kondiĉon, ke en la lingvo internacia ĝi estu, ekzemple, "Mosku"? Ankaŭ absolute nenio. Sekve, la geografiaj nomoj povas ĉiam esti internaciigitaj — kaj Esperanto faris tion ĉi en unuaj tagoj de ĝia ekzistado ¹⁾. Sekve, oni devas nur daŭrigi la laboron, komencitan de l' aŭtoro de Esperanto ankoraŭ antaŭ naŭ jaroj. Estas vero, ke tia laboro estas nek ekstreme facila nek tro produktanta, sed en ĉia okazo ĝi estas tute ebla.

Tiel por la geografiaj nomoj la demando pri ortografio ne ekzistas kaj mi diras — laŭ esenco de internacia lingvo ĝi ne povas ekzisti. Se vi kredigas viajn konatojn, ke Esperanto estas ekstreme facila lingvo kaj ke tiu-ĉi facileco estas atingita, interalie, danke al la neordinara simpleco de ĝi, kaj se vi post tio-ĉi komencas konvinki viajn aŭskultantojn, prezentante modelojn de E. kun nomoj *Doylestown*, *Guernsey*, *Greenwich*, *Växjö*, *Hölö* kaj t. p. — vi tre riskas igi gajecon de viaj aŭskultantoj kaj eble eĉ ricevi aludon pri la historio de l' turo de Babilono. Estas tre malfacile tielmaniere atingi tute kontraŭan celon de neŭtrala lingvo. La nacia ortografio devas ekzisti en la adresaro — por korespondado; sed la tuta lingvo internacia estas io pli ol adresaro.

Sekve tiu-ĉi demando povas ekzisti nur rilate homajn nomojn. Ili estas de du t.e. difrencaj ordoj: historiaj kaj nomoj de ordinaraj homoj. Unuaj apartenas antaŭ ĉio al tuta homaro — alie ili ne estus historiaj, — kaj jam poste al ia nacio, — tute kontraŭe, ol pensas s-ro R. Geoghegan ²⁾. Ke oni montru al ni — pro kiaj seriozaj kaŭzoj oni ne devas internaciigi ankaŭ ilin, t. e. esprimi ilin kiel eble plej precize per la sonoj de E.? Eble pro tio, ke tio-ĉi povas esti neeleganta por ia nacio? Sed se, ekzemple, *Ahilleus* (ankaŭ *Ahilles*) povas esti en lingvo franca "Achille" kaj tio-ĉi ne estas stranga, kial devas esti stranga en lingvo internacia la nomo pli proksima al sia originalo?


Restas la nomoj de ordinaraj mortuloj. Multaj pensas, videble, ke tie-ĉi estas la plej grava punkto de demando — sed tute vane. Kiel oni devas skribi tiujn-ĉi nomojn? Laŭ mia opinio — kiel plaĉas al iliaj posedantoj, ĉar rilate tiun-ĉi punkton la lingvo internacia havas rajton esti plej indiferenta. Se vi ne deziras, ke mi sciu, kiel sonas via nomo — estu tiel. Se oni aliigos ĝin iom — tio-ĉi ankaŭ ne estas grava afero, ĉar mia nomo, via kaj la nomo de ĉiu alia — kaj lingvo internacia, tute ne dependas unu de alia. *Tiuj-ĉi nomoj ne estas parto de neŭtrala lingvo.* Rusaj nomoj estas devigitaj uzi fonetikan ortografion; al aliaj oni povas konsili ĝin, almenaŭ en unua tempo, kun nacia ortografio en krampoj — por ia okazo — sed, mi ripetas — tiu-ĉi flanko de demando estas tre malgrava por la lingvo internacia.

¹⁾ N:o 1 de esperanta literaturo.

²⁾ L. I. 10—11. Al nia memideano ne estos, kredeble, seninterese ekscii, ke nur danke al tio, ke en la letero al s-ro O. li skribis sian nomon per rusaj literoj li fariĝis por multaj rusaj esperantistoj homo kuu nomo, ĝis tio lia nomo estis por ili kiel "libro kun sep sigeloj" kaj unu el plej estimataj laborantoj de lingvo int. estis por ili ne persono kun nomo, sed persono kun ia ordo de literoj.

Sumante ĉion diritan ni povas diri la sekvantan. La fonetika ortografio havas kaj ĉiam havos siajn malfortajojn. Sed per ĝi estos konservataj simpleco kaj facileco de la lingvo — kaj por tiu-ĉi celo oni povas fari malgrandetan oferon. Krom tio, la nacia ortografio estas ankoraŭ pli malkapabla helpi al la afero: Ĉiu vorto estas ja komplekso da sonoj sed ne da literoj. Tial geografiaj kaj historiaj nomoj — kiel elementoj de lingvo internacia povas esti kaj devas esti internaciigitaj. Demando pri aliaj propraj nomoj ne indas atenton: ilia rilato al la lingvo internacia estas okaza. Se mi eraras, mi eraras, kredeble, ne sola, kaj tial estus bone, se oni montrus al ni, ke lingvo internacia pli perdos kun tiu-ĉi eraro ol pli gajnos.

N. Borovko.



Al memoro de Jozef Wasniewski.

Floro falis ankoraŭ! Sekiĝis herbero kaj mortis
Velkis pro vintra la frost' ĝia verdanta foli!
Morto senkora, ho kial al Vi do estas permese
Fosi en fosa profund' ĉion la belan en mond'
Kial, ho kial faliĝas la herbo, verdanta sur mato,
Kial disiĝas de viv' freŝa, floranta ĝis nun?
— Dolĉa la morto por la maljunulo, la laca de vivo;
Kuas arĝenta la har' bele sur tomba cipres'.
Tiun ne plendu, ĉar lia ja estas feliĉa la sorto,
Ĉar en la tombon li mem iras kun ĝojo, sen tim'!
Dolĉa kaj morto junula, la mort' en mateno de l' vivo,
Antaŭ ol frosta la nokt' brulis burĝonon en ĝerm'!
Dolĉa la morto, kiam ne pasis la kredo je vivo,
Kiam ne trompa vivad' kovris flugilon per polv'!
Sed post, kiam junulo viriĝis kaj lasis la ludon.
Vivo nun estas ja ĉarm', nun malfeliĉo la mort'.
Tiam ja estas maldolĉe disiĝi de faro farata —
Ĝojus vidanta la kor' frukton de longa labor'.
— Kiu do ĉiam por noblaj ideoj vivadis, batalis,
Tiu kun akra malĝoj' iras en valon de ombr'.
Lasas la komencitaĵon kun pleje mordanta doloro
— Estas malgranda la ar', kiu batalis kun li!

*

Akra estas funebr'! Ĉar neniam pli noblan animon,
Ol forirantan la ĵus, trovos vi sur nia ter'.
Eĉ se vi iras, alia Diógenes, inter la homoj.
Kun la lumilo en man', *homon* serĉanta sur strat',
Tamen neniam en tuta la mondo renkonti vi povos,
Kiu, pli inda ol li nomon portanta de hom',
Vivon vere pli *homan* travivis, en senco profunda,
Vivon dediĉan al ĉi' alta kaj nobla en mond'.
Amo al ĉio, al ĉiuj, jen fundo de lia esenco,
Amo en faro kaj vort', jen kio estis li mem!

Por la premitaj, por ĉiuj suferoj, por la mizeruloj
Sentis la nobla anim' flame kaj varme ĉe li.
Ne eĉ iu al li konfidis vane doloron,
Vane neniu ĉe li frapis la pordon de kor'.

*

For li estas. — Ho kiu plenigos la lokon lasitan?
Kiu plenumos en mond' faron farotan de li?
For li estas. Sed tamen ĉe ni li ankoraŭ vivas,
Kiu en akra dolor' staras ĉe nova la tomb',
Ni konantaj l' animon poetan ne nur per la kantoj,
Kiu'n li donis al ni, sed per varma la ton'
El lia brust' eliranta kaj ĉion varmanta ĉirkaŭe,
Kie troviĝis la kord', kiu agordis al ĝi.
Nin neniam forlasos la bela, sunhela memoro
De la mortinta amik', lumos belege en kor'!
Tiel li vivas kaj tiel li estos vivanta, ĝis kiam
Restas neniu jam plu, kiu lin konis en ver'.

Valdemar Langlet.



El "Versaĵoj en prozo" de I. S. Turgenev.

La Regno lazura.

Ho, regno lazura! Ho, regno de l' lazuro, de l' lumo, de l' juneco kaj de la feliĉo! Mi vidis vin... en sonĝo.

Ni estis kelkaj homoj sur bela, ornamita ŝipeto. Kiel brusto de cigno sin plumbloviĝis blanka velo sub petolaj mastflagoj.

Mi ne sciis, kiuj estis miaj kolegoj; sed mi sentis per tuta mia ekzisto, ke ili estis ankaŭ junaj, ĝojaj kaj feliĉaj, kiel mi mem!

Mi eĉ ne rimarkadis ilin. Mi vidis ĉirkaŭe nur senliman lazuran maron, tute kovritan de ondetado de oraj skvametoj — kaj super mia kapo tia sama senlima, tia sama lazura maro — kaj tie, triumfante kaj kvazaŭ ridante ruliĝis afabla suno.

Kaj inter ni iafoje sonis rido sonora kaj ĝoja, kiel la rido de l' dioj!

Iam ankaŭ senatende el ies buŝo flugis vortoj, versoj plenaj de mirinda belo kaj de enspirita forto... la ĉielo mem ŝajnis sonorinta al ili responde — kaj ĉirkaŭe la maro tremis konsente... kaj poste ree venis feliĉa senbruo.

Facile trempigante sur molaj ondoj, naĝis nia rapida ŝipeto. Ne de venthelpo estis ĝi movata; niaj propraj koroj direktadis ĝin. Kien ni volis, tien rapidis ĝi, obea, kvazaŭ vivanta.

Ni renkontadis insulojn, mirindajn, duone travideblajn insulojn briletantajn per juveloj, ametistoj, safiroj kaj smeraldoj. Malsobrigantaj parfumoj fluetis el rondetaĵ bordoj; kelkaj insuloj superŝutis nin per la pluvo da blankaj rozoj kaj konvaloj; de aliaj sin levis senatende diverskoloraj birdoj kun longaj flugiloj. —

La birdoj flugis super ni, la konvaloj kaj rozoj malaperis en perla ŝaŭmo, glitinta apud plataj flankoj de nia ŝipeto.

Kune kun la floroj, kun la birdoj venis dolĉaj, dolĉaj sonoj... Virinaj

voĉoj aŭdiĝis en ili... kaj ĉio ĉirkaŭe: la ĉielo, la maro, la moveto de l' velo supre, la murmureto de l' fluo sub la kilo — ĉio parolis pri amo, pri feliĉa amo!

Kaj tiu virino, kiun ĉiu el ni amis — ŝi estis tie ĉi... nevidite kaj proksime. Ankorau unu momento — kaj radios ŝiaj okuloj, fletos ŝia rideto... Ŝia mano prenos la vian — kaj logos vin kun ŝi en la neniam-velkontan paradizon!

Ho, regno lazura! mi sonĝis vin!

Junio 1878.

V. S.



Demandoj kaj respondoj.

Respondoj al la demando 1.

A) Ĉiuj nomoj de *personoj*, kiuj estas uzataj kiel legaj diferenciloj de personoj, devas esti kiom eble malpli ŝanĝataj. Tial ĉiuj nomoj personaj, kiuj estas ordinare skribataj per literoj latinaj, devas resti tute sen ŝanĝo en la formo, en kiu ilin uzas ilia posedanto. Nomoj, kiuj estas skribataj de iliaj posedantoj per literoj ne-latinaj, t. e. ne esperantaj, devas esti skribataj fonetike. Nomoj geografiaj devas esti skribataj laŭ *loka* elparolado ĉiam, kiam tia elparolado estas konebla. En alia okazo oni devas simple transskribi la literojn. Sed ĉiam, kiam oni skribas ion en la teksto internacia ne fonetike, oni devas ĝin meti inter komoj (' ').

N. Evstifejev.

B) S-ro *W. Christiani* [Ĥristiani] rekomendas, ke oni ĉiam skribu la proprajn nomojn ortografie kaj fonetike, metante la fonetikan skribadon en krampoj. Por la francaj nazaj sonoj *on*, *in* k. c. oni bezonas apartajn signojn, aŭ oni povas ilin noti *ong*, *ing*. Ankaŭ devas tiam esti notitaj la sonoj kiel *and*, *ande*, *eau*, *eur* k. c. k. c.

C) Mi opinias, ke la propraj nomoj devas esti ĉiam skribataj ortografie en nia lingvo kun fonetika formo inter krampoj; ekzemple, mia nomo: *Costa e Almeida* (Kosta i Almejda). Tio ĉi respondas ankaŭ al la 4-a demando.

Costa e Almeida.

D) Komuna regulo de nia lingvo estas paroli tiel, kiel estas skribita, kaj returne. Kial malbonigi tiun ĉi regulon? Eble iam poste estos ellaborita vortaro geografia, kiu esperantigos nomojn proprajn en sia sfero. Ni devas celi plifaciligi tiun ĉi laboron. Kiam mi diros: "Nova Jorko", ĉu tiu ĉi nomo estos pli nereconebla al esperantistoj, ol "New York"? Aŭ vorto: "Varsovio", ĉu ne estos pli rekonebla ol "Warszawa"?

Pri nomoj de personoj simile: *Eŝilo*, *Tucidido*. Se nia lingvo estus kreita sole por skribado, oni devus skribi kiel nacie; sed feliĉe tiel ne estas. Nescianta lingvon francan elparolos laŭ literoj: *B-e-a-u-f-r-o-n-t*; ĉu vorto: "Bofron" ne estos pli simila al la originala elparolado? (Sinjoro de B. pardonu, ke mi uzas lian estimatan nomon kiel ekzemplon).

Fine, mi pensas, ke ni devas peni la egaligon de nia lingvo, sed ne enkonduki kadi malegalajojn.


St. Dmoĥovski.

Parta respondo je la demando 5:a ("L. I." n:o 1, 1897). *ĉu oni povas rimi "kur-aĝon" kun "sovaĝan", "birdaro" kun "kara".* — Rimo estas unusoneco de vortofinaĵoj. Ĉar en ne-artaj lingvoj la vokaloj ofte havas diversan elparoladon, la rimoj havas signifon nur por la oreloj, sed ne por la okuloj, kaj sekve la ortografio ne estas grava: pro tio ĉi la francoj rimas "innocence" kun "enfance", "Shakspeare" kun "empire"; la germanoj rimas *nennen-können*, *fehlt-erzählt* (kvankam *e* kaj *ö*, *eh* kaj *äh* havas diversajn sonuancojn). Tamen en la l. Esperanto ĉia litero havas unu difinitan sonon. Kial do oni povas respondi je la demando?

En la l. rusa ĉia neakcentata finaĵo estas elparolata sufiĉe neĝuste, kaj la nuanco de la lasta vokalo iom perdiĝas, ĝi ne estas akra; la vorton "ve'ko" (palpebro) oni elparolas ne *vĕ-kō*, sed *vĕ-kŭ*, t. e. ĝi prezentas ne "spondeon" (vorto kun du longaj silaboj, kiel la latina "gaudēnt"), sed "troŝeon" (vorto, kies unua silabo estas longa, kaj la dua mallonga, kiel la latina "arma"). Tiamaniere la lasta neakcentata vokalo *a* aŭ *o* perdas siajn akrajn karakterojn aŭ nuancojn, oni ricevas neŭtraĵon, kiu troviĝas inter *a* kaj *o*, kaj oni oftege rimas: *ve'ko-ĉelove'ka*, *ĥléba-nébo*, *siĥo-múĥa* k. c. *) Kiel faras aliaj lingvoj, ep kiuj troviĝas vortoj, akcentataj ne sur la lasta silabo, tion ĉi volu respondi niaj divers-naciaj esperantistoj. Ĉu oni povas en la l. germana rimi *Riviera* (geografia nomo) kun *Nero*?

Sajnas ke ekster la slavo ankau aliaj nacioj elparolas neakcentatajn vokalojn tre sendifine. Sekve la fina solvo de la starigita demando dependas de la nacioj, kies vortoj ne estas escepte akcentataj sur la lasta silabo. Mi invitas la esperantistojn klarigi tiun ĉi punkton: la temo ne estas malfacila.

A. Kofman.



Informejo de esperantistoj.

Deziras korespondadi en Esperanto:

O. J. Stenborg. Askersund. *Svedujo*.

Petr Jaroslavcev. Voskresenskaja ul., dom de Aleksandrova, kv. Bjelorossovoj. Jaroslavl. *Rusujo*.

Miĥail Konstantinoviĉ Solorjev. Dom Spaso-Proboinskoj cerkvi. Jaroslavl. *Rusujo*.

Deziras korespondadi kun 17- aŭ 18-jaraj junuloj.

S-ro Gabriel Chavet, elève au collège de Louhans.

S-ro Paul Gadellat, elève au collège de Louhans.

S-ro Adolphe Jaillet (contributions indirectes) rue des Bordes à Louhans.

S-ro Charles Dannenmüller, rue des Bordes, Louhans.

S-ro Louis Sadeiner, rue de Chateaurenaud, Louhans.

Adr. Louhans (Saône et Loire) *Francujo*.

Por informoj kaj vizitoj en Åbo, Finlandujo oni povas sin turni al

S-ro J. F. Reinius, kaj

Fr-ino Edith Reinius, Nylandsgatan 9. Åbo.

Agentoj de la lingvo Esperanto:

5. S-ro Ernfrid Hellgren, Vestra Kanalĝatan 5 b. *Karlstad*.


6. S-ro K. Täcktor, Djurgårdsgatan 15. *Linköping*.

7. S-ro Hjalmar Bäckström. *Luleå*.

8. D-ro E. Collinder, lerneja adjunkto. *Sundsvall*.

9. S-rino Mathilda Rosendahl. *Karlstad*.

Ĉiuj en *Svedujo*.



*) Tiu ĉi intermikso de neakcentataj sonoj *a* kaj *o* estas ŝajne ne okaza, t. e. ĝi estas rimarkata ne sole ĉe rusoj, sed kredeble dependas de la konstruo de homaj parolorganoj. La leganto povas fari jenan provon: li elparolu la sonon *o*, iom-post-iom kaj ĉiam pli kaj pli malfermante (kaj larĝigante) la buŝon, kaj li klare aŭdos ke *o* transformiĝas en *a*; kontraŭe, elparolante la sonon *a* kun larĝe malfermita buŝo kaj iom-post-iom kuntirante la lipangulojn, li senerare aŭdos ke la sono *a* transformiĝas en *o*. Tiamaniere la ambaŭ sonoj estas tre interproksimaj, kaj mi emas pensi ke je la dirita intermikso estas subĵetitaj ne sole la rusoj.

Adresaro de niaj abonantoj en 1897.

En Svedujo:

1. Adelsköld, Cl. eksmajoro. Villagatan 2. *Stockholm*.
2. Agrell, Sigurd. *Örebro*.
3. Ahlberg, P., policisto. Döbelnsgatan 50. *Stockholm*.
4. Arell, Gust., *Söderhamn*.
5. Chrona, policisto. Storgatan 23. *Stockholm*. [Ahlberg].
6. Dandernell, P. F. *Köping*.
7. Ersson, Anders. Bonäset. *Ström*.
8. Etzel, E. E., fil. kand. Torsgatan 11. *Uppsala*.
9. Fleetwood, C. E. Österplan 3. *Uppsala*.
10. Fr-ino v. Gedda, Alma. Fiskeboda. *Ås*.
11. Halling, E. Handtverkaregatan 24 b., 4 tr. *Stockholm*.
12. Hasselroth, Axel. Lundagård. *Oskarshamn*.
13. Holm, Karl. S:t Larsgatan 6. *Uppsala*.
14. Holmqvist, O. Österplan 5. *Uppsala*.
15. Fr-ino Hultén, Anna. *Kalmar*.
16. Krikortz, S. E., dro. Scheelegatan 9. *Stockholm*.
17. Langlet, Valdemar. fil. kand. Klostergatan 4. *Uppsala*.
18. Lindén, C. A., policisto. Döbelnsgatan 50. *Stockholm*. [Ahlberg].
19. Lindgren, Johannes. Johannesgatan 26. *Uppsala*.
20. Lindström, O. E., lerneja adjunkto. *Böllnäs* (post monato Julio: *Östersund*).
21. Lundström, S. A., pastro. *Jättendal*.
22. Magnusson, A. V., policisto. Holländaregatan 21 A. *Stockholm*. [Ahlberg.]
23. Mattsson, Emanuel. Sysslomansgatan 19. *Uppsala*.
24. Norin, Henning. *Fjelkinge*.
25. Nylén, Paul. Erikslund 1. *Uppsala*.
26. Olsson, A. P. Kungsgatan 32. *Uppsala*.
27. Olsson, O. Prestgatan 44. *Östersund*.
28. Planting-Gyllenbåga, majoro. *Tranås*.
29. Sahlberg, E. Söderhamns tidning. *Söderhamn*.
30. Sandborg, Alfr. Vestmanl.-Dala nationshus. *Uppsala*.
31. Fr-ino v. Schmiterlów, A. Tagel. *Moheda*.
32. Siösteen, B. G. Köpmansgatan 8. *Göteborg*.
33. Ström, Ragnar. *Hernösand*.
34. Sundström, Harald. Kungsgatan 32. *Uppsala*.

35. Svanbom, K. O., pastro. *Knutby*.
36. v. Sydow, C. W. *Weviö*.
37. Täcktor, K., stud. Djurgårdsgatan 15. *Linköping*.
38. Vahlström, Vilh. *Söderhamn*.
39. Vidén, Axel, policisto. Kungsholms polisstation. *Stockholm*.
40. Wijkström, Karl. *Oskarshamn*.
41. Fr-ino Ödmann, Gerda. Villa Kina, Haga. *Stockholm*.

En Ameriko:

42. French, E. D. 204 West, 46: th Str. *Newyork*. U. S. A.
43. Geoghegan R. H. 204 South I Str. *Tacoma*.
44. Steckel, Edward L. *Doylestown*. Penn. U. S. A.

En Australio:

45. Bateman, A. W. Box. 810. G. P. O. *Sydney*.

En Austrujo—Hungarujo:

46. Brych, Friedrich. *Josefstadt*. Böhmen.
47. Forkarth, Josef. *Josefstadt*. Böhmen.
48. Socha, Josef. Princa bienadjunkto. *Feldsberg*. Niederösterreich.
49. Sperl, Rudolf. K. K. Beamter. *Leoben*. Steiermark.
50. Wagner, Josef. Princa bienadjunkto. *Feldsberg*. Niederösterreich.

En Finlandujo:

51. Björklund, Alfr. Strandgatan 1. *Uleåborg*.
52. Fr-ino Blomberg, Signe. Slottsgatan 7. *Åbo*.
53. Bomansson, Gunnar. Saltvik. *Mariehamn*.
54. Englund, Gösta. *Uleåborg*.
55. Nordenstreng, Rudolf. Riddargatan 2. *Helsingfors*.
56. Reinius, J. F. Nylandsgatan 9. *Åbo*.
57. S-rino Vesén, Selma. Nylandsgatan 3. *Helsingfors*.
58. Åkerblom, Victor. Strandgatan 1. *Uleåborg*.

En Francujo:

- 59—108. de Beaufront, L. *Epernay*. Marne.
109. Fr-ino Koutsch, Dina. 49 rue d'Amsterdam. *Paris*.
110. S-rino Wærn, Axelia. Les Abeilles. *Arcachon*.

En Germanujo:

111. **Ebner**, Ad. Paraplatz 7. *Königsberg*. Prusujo.
112—116. **Klubo Esperantista**. *Nürnberg*. Bavarujo.

En Hispanujo:

117. **Serapio**, A., kuracisto. Hospitalillo 9. *Santiago*, *Coruña*.

En Italujo:

118. D-ro **Marignoni**, Daniele. *Crema*.

En Portugalujo.

Ĉe d-ro *Costa e Almeida*:

119. **Albano de Magalhães**, d-ro. *Rezende*.
120. **Alvaro de Azeredo**, d-ro. *Rezende*.
121. **Auspicio A. Dias Ferreira**. *Felgueiras*.
122. **Costa e Almeida**, d-ro. *Rezende*.
123. **Cruz Capello**, d-ro. *Rezende*.
124. **Fortunato de Magalhães**. *Felgueiras*.
125. **Francisco Pinto Pereira**. Rua Nova de S. José. *Régoa*.
126. **Honorato J. da Matta**. *Loures*. *Lisbóa*.

En Ŝvisujo:

127. **Bogdanov**, Miloslav S., étudiant de droit. Université. *Genève*.

En Rusujo

(Abonantoj ĉe la redakcio en Uppsala).

128. **Ender**, Fr. Czepow p. Uniczow. gub. de Kalisz, Polujo.
129. **Fraenkel**, A. B. Malij prospekt 37, *Rostov na Don*.
130. **Grabowski**, H. Fabriko de s-ro Paluŝin. *Ivanovo-Vosnezensk*. gub. de Vladimir.
131. **Lippmann**, Gustav. Schmiede-brücke, möbl. Zimmer Sacharine. *Moskva*.
132. S-rino **Nadejdina**, K. A. *M. Paviči*; gub. de Minsk.
133. **Serck**, Oskar. *S:t Peterburg*.
134. de **Ziemkiewicz**, Romuald. Ogródowa 25, m. 20. *Varsovio*. Polujo.
(ĉe V. Gernet, Odessa).
135. **Abesgus**, M. M. *Baku*. (Kavkaz). Kievski Promiŝlennij Bank.
136. **Aĥnovskaja**, instruistino. Ĵenskaja gimnazia. *Grodno*.
137. **Andreev**, Aleksandr Iljiĉ, dentisto. *Odessa*, Deribasovskaja, 19.
138. **Arnold**, Anatoli Maksimilianoviĉ. *Odessa*, Staroportofrankovskaja 27, 14.
139. **Avalov**. *Tiflis*. Tovariŝĉestvo sadovladelcev "Kaĥetia".
140. **Avilov**, Fedor Dmitriĉ. I-a gimnazio. *Tiflis*.

141. **Avsenev**, Aleksandro. *Buturlinovka* (gub. de Voronej).
142. **Azarov**, inĝeniero. *Aĉinsk* (gub. Jenisejskaja).
143. **Baranov**, Dmitri Klimentjeviĉ. *Ĥarkov*. Mariinskaja, 22.
144. **Biblioteka** Artilerijaskaho Sklada. *Kremenĉug*.
145. **Biblioteka** Gorodskaja. *Kremenĉug*.
146. **Biblioteka** Obŝĉeestvennaho Sobranija. *Kremenĉug*.
147. **Bogatenko**, Jakov Aleksejeviĉ. *Moskva*, Nemecki Rinok, Gavrikov per. domo de Brovkin kaj Tregubov.
148—149. **Borovko**, A. J. kaj N. A. *S.-Peterburg*. Karpovka, 20.
150. S-rino **Borovko**, Serafima Afrika-novna. *Odessa*, Pavlovskoje zdanie, 40.
151. **Bunicki**, E. Ugol Ĥersonskoj i Torgovoj, d. de Krasnokutski, loĝ. 20. *Odessa*. [Iglicki].
152. **Chrzanowska**, Maria. *Belostok* (gub. de Grodno).
153—154. **Cvetkov**, Petr Miĥajloviĉ, inĝeniero. *Aleksandropol* (gub. Erivanskaja), zastava *Ĝaĝur*.
155. S-rino **Davidenko**, Nastasija Vasiljevna *Jalta*, d. de Koĉubej. [O].
156. **Davidoviĉ**, Lev Akimoviĉ. *Odessa*, Riŝeljevskaja 44.
157. S-rino **Dettling**. *Kremenĉug*, Kafejo de Wien.
158. **Devjatnin**, V. N. *Gedrojei* (gub. de Vilno).
159. **Dmohovski**, St. *Novo-Aleksandria* (gub. de Lublin), Pulawy.
160. **Dombrovski**, A., pastro. *Kovno*.
161. **Dombrovski**, B. *Novo-Aleksandria* (gub. de Lublin).
162. **Evneviĉ**, Eugeni Nikolajeviĉ, zemski naĉalnik. *St. Gorelovo*, Mologski ujezd, (gub. de Jaroslavl).
163. **Evstifejev**, Nikolaj Petroviĉ. *Krasnojarsk*, kontoro de inĝeniero Knorre.
164. **Fedorovski**, V. M. *Moskva*, Mjasnic-kaja, domo de Staĥejev, kontraŭ domo de Liphart.
165. **Feldŝar**, J. Ribnaja 23, *Nikolajev* (gub. de Herson).
166. S-rino **Fiks**. Ugol Ekaterinskoj i Bolŝoj Arnautskoj, domo de Fiŝman, *Odessa*. [Iglicki].
167. **Gabbe**, Vladimir Nikolaeviĉ. *Odessa*. Troickaja, 6.
168. **Gejŝpic**. Komitet Inostrannoĝ Cen-zuri. *S.-Peterburg*.
169. **Gernet**, V. Puŝkinskaja 44, *Odessa*.
170. S-rino **Glazer**, M. J., instruistino. *Odessa*. Ugol Bolŝoj Arnautskoj i Ekaterininskoj, domo de Fiŝer [Iglicki].
171. **Goldberg**, Mozes. *Narovi* (gub. de Minsk).

172. S:rino **Golubickaja**, Anna Semenovna. *Novomoskovsk* (gub. de Jekaterinoslav).
173. S:rino **Grineva**, A. M. *S.-Peterburg* (per adr. de N. Borovko).
174. **Gruvman**, Simon Nušimovič. Selo *Komarovka*, tra m. *Teplik* (gub. Podolskaja).
175. **Grünfeld**, A. M. *Kiev*. Novo-Elizavetinskaja 8, loğ. 10.
176. **Halperin**, Vladimir Prokofjevič. *Kajnsk* (gub. de Tomsk). Okružnij Sud.
177. S:rino **Herzman**, M. F. *Odessa*. Dvorjanskaja, 14, loğ. de Iglicki [Iglicki].
178. **Hübert**, K. K. *Aleksandrovska* (gub. de Jekaterinoslav).
179. **Hojnacki**, Antoni. *Varsovio*, predm. Praga, Lošovskaja, 8.
180. **Iglicki**, M. M. *Odessa*. Dvorjanskaja, 14, loğ. 7.
181. **Jankovski**, P. K., inženiero. *S.-Peterburg*. Fontanka, 116, loğ. 32.
182. **Jarošenko**, A. P., *Sevastopol*. Štab Černomorskaho Flota.
183. **Javorski**, Vasili Varfolomejevič, akcizni činovnik. M. *Kamenka*, F. žel. dorogi.
184. **Jezerski**, M. *Volkovisk* (gub. de Grodno).
185. **Jomudski**, Ivan Nikolajevič, štab-rotmistro. *Borisoglebsk* (gub. de Tambov). Kavaleria Kazerno. [N. Kazi-Girej].
186. **Jurevič**, Albin. *Varsovio*. Maršalkovska, 138 [Wasniewski].
187. **Jarnovski**, Pavel Avreljanovič. *S.-Peterburg*. Sergievskaja, d. N:o 17, l. 21.
188. **Jitkov**, Stepan Vasiljevič. *Odessa*. Agentstvo Russk. Obšč. Parohodstva i Torgovli v Praktičeskoj Havani.
189. **Jivotovski**, J. A., *Odessa*. Redakcio de "Odesskaja gazeta".
190. S:rino **Jondeckaja**, Evgenia Pavlovna. S. *Generalskoje*, gub. de Samara, ujezd Novouzenski.
191. **Juk**, P., d:ro. *Brusilov* (gub. de Kiev) [Kaminski].
192. **Kadik**, P. *Krasnojarsk* (gub. Jenisejskaja). Mujskaja Gimnazia.
193. S:rino **Kaminskaja**, L. D. *Brusilov* (gub. de Kiev). [Kaminski].
- 194—195. **Kaminski**. I. D. *Brusilov* (gub. de Kiev).
196. **Kanalošy-Lefler**, F. F. *S.-Peterburg*. Soljanoj Pereulok 6.
- 197—198. **Kazi-Girej**, Nikolaj Aleksandrovič. St. *Borisoglebsk*. S. O. Fervojoj.
199. **Kofman**, A. S. *Odessa*, Nežinskaja 34.
200. **Kolb-Selecki**, Adam Vikentjevič. St. *Rahni-Lesovije* (gub. Podolskaja). En Kontoron de Špikovskoje Imenije.
201. **Korolenko**, V. G. *S.-Peterburg*. Bassejnaja 10.
202. **Kravecov**, Vasili Lvovič. *Voronej*. Ugol 2-j Devickoj i Lesnoj, d. Popova.
203. **Kušnir**, Naum Iosifovič. *Teplik*. (gub. Podolskaja).
204. **Kvasnevski**, A. A., vojennij vrač. *Sibirsk*.
- 205—210. **Laskin**, V. I. *Roslavl* (gub. de Smolensk). Progimnazio.
211. **Leščinski**, Jules, inženiero. St. *Buturlinovka* (gub. de Voronej). Načalniku 28:oj distancii.
212. **Levitski**, V. P. *Uman* (gub. de Kiev).
213. **Lojko**, Ivan Markovič. Glavnij buhalter Libavo-Romenskoj Žel. Dorogi *Minsk*.
242. **Lucenko**, I. M., d-ro. *Odessa*. Jamskaja 64—66.
- 214—215. S:rino **Mankov kaja**, E. *Kremenec* (gub. Volinskaja). Ženskoje Učilišče.
216. **Melenevski**, F., leütenanto. *Rovno*. 125-a piedira Kurska Regimento.
217. **Miropolski**. *Odessa*. Puškinskaja, 34, loğ. 8.
218. **Moskovčenko**, Ivan Eremejevič. St. *Rahni-Lesovije* (gub. Podolskaja). Kontora Špikovskaho Imenija.
219. **Narcov**, Aleksej Nikolajevič. *Tambov*. Invalidnaja, propra domo.
220. **Naumov**, Aleksej Jakovlevič. St. *Sylva*, Urala fervojo.
221. **Nejman**, Oskar. P. adr. I. K. Frejman. *Libava*.
222. S:rino **Nömm**, Amalija Jegorovna. *Jalta*, d. de Kočubej. [O].
223. **Ostrovski**, Ilja Davidovič, d:ro. *Jalta*.
224. **Pergament**, Osip Jakovlevič. *Odessa*. Počtovaja, domo de Atlas.
225. **Pesocki**, Andrej Andrejevič. *Kremenčug* (gub. de Poltava). Artilerijiski Sklad.
226. **Petrjajevski**, K., poručik Hvalinskaho rezervnaho bataljona. *Saratov*.
227. **Poltavskaja Obščestvennaja Biblioteka**. *Poltava*, d. Kandiba. [Zinovjev].
228. **Popov**, G. D., inženiero. Stacio *Burnak* de Sud-Orientaj Fervojoj: Staciodomo [N. Kazi-Girej].
269. **Portnov**, I. Kamišin (gub. de Saratov).
230. S:rino **Prohorovič**, Aleksandra Vasiljevna. *Varsovio*, Juravja 15, l. 9.
231. **Postnikov**, F. *S.-Peterburg*. Nabeřejnaja Karpovki, 20 [Espero].
232. **Raekson**, Jak. Tra *Fellin* (gub. Liflandskaja). *Pajstel*, *Karlij*.
233. **Rakitski**, M. S. *Orša* (gub. de Mogilev). Čerez Kancelariju Lesničaho.
234. **Razsušin**, Innokenti Aleksandrovič. učitel Golumetskaho Učilišča. St. *Seremhovskaja* (gub. de Irkutsk).
235. **Rejner**, V. Rjazan. Dvorjanskaja, d. de Kalmanok.
236. S:rino fon **Ritter**, Jelizaveta Nikola-

- jevna. *Saratov*, upravljenje Rjazansko-Uralsk. žel. dorogi, tehničkoje ot-delenije dvijenija.
235. **Rjabinin**, Grigori. *Ĥarkov*. Ćernišovskaja 30.
236. S:rino **Rogovskaja**, Maria Ivanovna, dumski vrač. *S.-Peterburg*, Vas. Ostrov, 14 lin., d. 23.
237. **Rojnovski**, Stanislav Josifovič, d.ro. Urbo *Borisoglebsk* (gub. de Tambov). [N. Kazi-Girej].
238. **Rozanov**, N. J. *Moskva*, Šeremetjevskaja Bolnica, kv. N:o 15 [V. Laskin].
239. **Scheinberg**, Samuil. Imenije *Polonka*, čerez m. *Svisloč* (gub. de Grodno).
240. **Schilejev**, V. N. *Novočerkask* (Don-skaja Obl.). S.-Peterburga prospekto. N:o 5.
241. S:rino **Sereda**, Maria. *Swaj* (gub. de Ćernigov).
242. **Sloušč**, N. D. *Odessa*.
243. **Slucki**, Avrum. *Korsun* (gub. de Kjev).
244. **Smoljn**, Miĥail Miĥajlovič *Astrahan*. Naberejnaja Kanala, d. Dmitrieva.
245. **Solodiĥin**, Vasili Timofejevič. *Vladimir*, Ivanovskaja 202.
246. **Solovjev**, Jakov Sampsonovič. *Mjasogutovo*, gub. de Ufa, ujezd Zlatoustski.
247. **Solovjev**, Nikolaj Matveič, kontroler. *Vladivostok*, Sibir, Primorskaja oblast. [Zinovjev].
248. **Spektor**, Boruĥ. M. *Teplik* (gub. Podolskaja).
249. **Stankievič**, V., štabs-kapitano. *Skernevici* (gub. de Varsovio).
250. S:rino **Stepanova**, Olga Apollonovna. *Bogučar*, ĥutor *Lebedinka* (gub. de Voronej). [V. Kravcov].
251. **Strzalkovski**, Edmund Florianovič, apotekisto. *Nerčinski Zavod* (Obl. Zabajkalskaja).
252. **Sutkovoj**, N. *S.-Peterburg*, Anglijski pr. 25, loĝ. 4.
253. **Šaĥalibekov**. *Taškent*. Kancelarija General-Gubernatora.
254. S:rino **Šalevič**, Vanda. *Gorodišč* (gub. de Minsk). Imenije Dorogovo.
256. **Šatunovski**, Grigori Osipovič. *Kamenec-Podolsk*.
257. **Šatunovski**, Samuil Osipovič. *Odessa*. Puškinskaja, d. de Marmariro.
258. **Ščavinski**, Timofej. *Melitopol* (gub. Tavričeskaja). Kuznečnaja, domo de Pozin.
255. **Šetalov**, I. I. *S.-Peterburg*. Ul. Glinki. N:o 1. Obščestvo Strahovanija Jižni.
261. **Širjajev**, I. *Mologa* (gub. de Jaroslavl), selo *Vereteja*.
259. **Šmurlo**, Vladimir Francovič. *S.-Peterburg*, Fontanka 110.
260. **Špetilnikov**, Viktor Vasiljevič, podporučik. *Krasnojarsk*. V kancelariju bataljona.
262. **Štalberg**. *Reval*. Bolšaja-Jurjevskaja 309.
263. **Tenisov**, Vitold Konstantinovič. *Nižni-Novgorod*, Ostrojnaja ploščad, domo de Ejov N:o 6, loĝ. 2.
- 264—265. S:rino **Trahtenberg**, B. Š. *Teplik* (gub. Podolskaja). [Kaminski].
266. **Tregubov**, Nikolaj Miĥajlovič, pomoščnik statistika. *Herson*. Gubernskaja Zemskaja Uprava.
267. **Tripolski**, K. A. Vinokurennij Zavod. M. *Červonnoje*, tra *Berdičev*.
268. **Waĥer**, W. *S.-Peterburg*. Oficerskaja 54.
269. **Wasniewski**, Jozef. *Varsovio*. Strato Szkolna 8 m. 5.
270. **Wiens**, Henriĥ. Selo *Polovica*, čerez *Novomoskovsk* (gub. de Ekaterinoslav).
271. **Vojejkov**, Vasili Nikolajevič. *Sudja* (gub. de Kursk). Selo *Guevo*.
272. **Vorobjev**, A. A. Glavnija Masterskija Vladikavkazskoj Žel. Dorogi. *Postov a Don*.
273. **Zabusov**, N. P., d.ro. *Kazan*, Popova gora, domo de Zastrov.
274. **Zakrjevski**, Aleksandr. *Smolensk*. Oficerskaja Sloboda, domo de Erdeli.
- 275—279. **Zamenhof**, L. M., d-ro. *Grodno*.
280. **Zilbernik**, S. *Kovno*.
- 281—285. **Zinovjev**, A. A. *Poltava*, Sadovaja, propra domo.

Abonantoj ĉe la poŝto.

286—300. (La adresojn de niaj poŝtaj abonantoj ni poste donos, kiam nur ni ilin ricevis de la abonantoj mem.)

* * *

La Adresaro estos daŭrigita en n:o 6.



La gazeton Lingvo Internacia oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Hispanujo** ĉe A. Serapio *Santiago*, Hospitalillo 9, (Coruna).
- „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Puŝkinskaja, 44, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Upsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

MARKI.

Poŝtsignoj, Timbres-Poste, The Stamps, Die Briefmarken, Gli Francobolli, Los Sellos,

Ĉiumonata ilustrita ĵurnalo por filatelistoj, organo de l' Moskva societo filatelista.

Kosto de abono — 1 rublo, sur la papero pli bona — 2 rubloj.

Oni abonas ĉe s-ro C. D. Solomkin: Rusujo. Kiev. Bulvarno-Kudrjavskaĵa, 23.

Kore ni petas la odesajn esperantistojn atente tralegi la sekvantantan anoncon:

En lavejo "Ekonomio" de A. Miropolski kaj P. Juzefov, Odeso, Kolontajevskaĵa str., domo de Sagomonov, N:o 7,21, oni akceptas por lavado tolaĵon, lanaĵon, silkaĵon de ĉia speco, kaj oni purigas kurtenojn. Laŭ la deziro de l'mendantoj oni liveras la tolaĵon hejmen. *Oni parolas en Esperanto kaj instruas ĝin tie al ĉiuj dezirantoj senpage.* — Malgrandajn rebonigojn de l' tolaĵo oni faras senpage.

La ĵurnalon

"L'Etranger",

kiu presas artikolojn interalie en la lingvo Esperanto

oni abonas en Rusujo ĉe s-ro

V. Gernet,

Odessa. Puŝkinskaja 44.

La abonpago — 2 r. 80 k. por unu jaro.

Sinjoro E. Arduin

komercisto en *Bordeaux*, 11 rue *Turenne*, **Francujo**, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de siaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinberco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al ĉi tiu la akleran vendadon l' de produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

Ni petas reaboni.

Por eviti malordon ĉe la dissendado de la unuaj numeroj de "Lingvo Internacia" en la nuna jaro 1897 ni tre petas tiujn esperantistojn, kiuj deziras ricevadi plu nian gazeton, *aboni* ĝin plej eble frue, aŭ almenaŭ sciigi la redakcion pri sia deziro esti abonantoj en la nuna jaro. La kondiĉoj de la abono restas la antaŭaj, t. e. 3 kronoj = 3,30 germ. markoj = 4,25 frankoj = 1000 rejsoj = 1,50 rubloj por la jara ekzemplero, kaj unu senpaga ekzemplero al ĉiu, kiu alsendos al ni 4 pagajn abonojn.

La abonantojn, kiuj abonas la "Lingvon Internacian" per la poŝto, ni petas sendi al ni siajn adresojn, por ke ni povu ilin presi en la gazeto.

Niajn kunlaborantojn

ni kore petas, ke ili volu skribi ĉion difinitan por la gazeto legeble kaj nur sur unu flanko de papero. La redakcio.